

alproksimiĝis al ŝi—ĉe ĉiu flanko po unu—kaj tre larĝe malfermis la okulojn kaj buŝojn. Tamen dum la rakontado ŝi iom post iom fariĝis pli sinfida.

La aŭskultantoj restis tute trankvilaj ĝis ŝi rakontis pri la deklamo (antaŭ la Raŭpo) de la poemo “*Patro Vilĉo*.” Kiam ŝi diris al ili ke la vortoj elvenis el la buŝo tute malpravaj, la Falsa Kelonio profunde enspiregis kaj diris “Jen tre kurioza fakto.”

“Apenaŭ povus esti io pli kurioza” aldonis la Grifo.

“La vortoj elvenis malpravaj” ripetis la Falsa Kelonio, kaj profunde pensis.

Post kelkaj momentoj ĝi diris:—

“Mi do tre ŝatus aŭskulti, se la Fraŭlino volus nun deklami ian versaĵon. Vi ordonu ke ŝi komencu.”

Li rigardis la Grifon kvazaŭ li kredas ke ĝi havas la rajton ordoni ŝin.

“Vi stariĝu” diris la Grifo al Alicio kaj deklamu “*la Dormemulo*.”

“La kreitaĵoj ja terure ordonadas min” pensis Alicio “kaj igas min deklami la parkeraĵojn same kiel se mi estus en la lernejo.”

Tamen ŝi leviĝis kaj komencis la deklamon, sed ŝia kapo pleniĝis de la Omara Kvadrilo en tia grado ke apenaŭ ŝi konsciis kion ŝi diras, kaj la vortoj venis tre, tre kurioze:—

LA OMARA KVADRIL

Jen la voĉo de l' Omar' ! mi aŭdis la k...
“ Vi min bakis tro brune, vi iru Azio
La hararon netigas en ĉiu okazo
La anas' per l' okuloj, sed li per la na
Kiam seka la sablo, li kvazaŭ monarĥo
Malestime parolas et pri la ŝarko.
Kiam tajdo kun ŝarkoj amase enfluas
Malŝera la voĉo per kiu li bruas.

“Tiu certe ne estas la vortoj kiuj en la infaneco” diris la Grifo.

“Tiujn vortojn mi neniam aŭdis ĝis ĉi momento” diris la Falsa Kelonio “nur sensencaĵo.”

Alicio diris nenion. Fininte la sidigiĝis, metis la manojn al la kapo, ĉu iam ŝia vivo refariĝos ordinara.

“Mi tre volus scii la klarigon de ĉi la Falsa Kelonio.

“Ŝi ne povas klarigi” la Grifo vmetis. “Eldiru la duan version.”

“Sed pri lia hararo” persistis la Fa “li fakte ne povus netigi ĝin per la

Alicio havis nenion por diri; ŝi ilin senhelpe.

“Vi eldiru la duan version” ripes “ĝi komenciĝas per la vortoj ‘*A pasante—*’”

Alicio ne kuraĝis malobei, kvani certa ke ĉio nepre elvenos malp tremanta voĉo ŝi eldiris:—